

Heinrich Heine, Softe vibras tra l'anim'	tra	Heinrich Heine, Milde fluas tra la kor'	tra la	Heinrich Heine, Printempa saluto
--	-----	---	--------	-------------------------------------

<i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i>		<i>tradukita de Valentin Melnikov</i>		<i>tradukita de Ludwig Emil Meier</i>
-------------------------------------	--	---------------------------------------	--	---------------------------------------

Softe vibras tra l'anim' melodi' tenera, flugu al la malproksim', kanto primavera!		Milde fluas tra la kor' kanto primavera. Flugu, melodi-sonor', en la vast' aera.		Iras ĉarma sonoret' Tra de mi animon. Sonu printemo kantet' En la malproksimon!
---	--	---	--	--

Flugu al florbeda dom', kaj se tie ĉarme ridos roz', en mia nom' ŝin salutu varme.		Flugu longe, sen ripoz', super domoj flutu. Se troviĝos tie roz' – ĝin de mi salutu.		Ĝis la dom' forsonu vi, Kie floroj pendas! Diru al la roz', ke mi Saluteton sendas.
---	--	---	--	--

*Traduko de la Germana poemo
“Frühlingsbotschaft” de HEINRICH
HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-
17) en Esperanton de KÁLMÁN
KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo,
1911 – †1976).

*Arg-527-1088 (2010-05-27
11:29:19)*

*El la poezia volumo “Kanzonoj de
Heine”.*

*Traduko de la Germana poemo
“Frühlingsbotschaft” de HEINRICH
HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-
17) en Esperanton de Valentin
Melnikov.*

*Arg-527-1044 (2010-03-15
17:53:18)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo estas -
kun permeso de s-ro Valentin Mel-
nikov - prenita el ties reta kolekto
[http://www.esperanto-mv.
pp.ru/Melnikov](http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov) . Vidu:
[http://www.esperanto-mv.
pp.ru/Melnikov/Heine.html](http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html) .
Vidu ankaŭ: [http://www.
esperanto.mv.ru/Melnikov/
index.html](http://www.esperanto.mv.ru/Melnikov/index.html) .*

*Traduko de la Germana poemo
“Frühlingsbotschaft” de HEIN-
RICH HEINE (*1797-12-13 –
†1856-02-17) en Esperanton de
LUDWIG EMIL MEIER (*1847-
02-16 – †1919) en 1908.*

*Arg-527-1045 (2010-03-14
15:53:26)*

*Tiu ĉi esperantigo de la poemo
estas vere iom fuŝe tradukita. Ĝi
aperis en programo de koncerto
el la jaro 1908 (laŭ informo de
la dana s-ano Lars Kromann
[lars.kromann@mail.dk]. Pri
Ludwig Emil Meier rigardu
ankaŭ la vikipedian retejon
[http://eo.wikipedia.org/
wiki/Ludwig_Emil_Meier](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier) . Li
verkis interalie la kant-libreton
“Esperantista Kantaro”, kiu
aperis en 1907 ĉe la Esperan-
ta eldonejo de Hans Theodor
Hoffmann en Berlino.*